

Laŭ La Spuro De Santer

Je tiu malfrua sezono, ne restis al ni multe pli ol du horoj ĝis la vespero. Ni devis tree hasti. Ĝi gravis, rajdi laŭeble longan distancon ĝis la malheliĝo, ĉar ni tiam devis atendi la sekvantan matenon. Ni ne povis rajdi sen vidi la spuron.

Aliflanke estis supozeble, ke Santer uzus la vesperon, kaj certe ankaŭ l nokton, pro antaŭiĝi for de ni. Ke oni persekutis lin, tion li sciis senkondiĉe. Tiel ni devis fari egan rajdadon je la sekvinta tago, kiu estus malfaciligota per la fakto, ke ni atentigu pri la spuro. Tia malrapidiĝo ne necesis al li. Sed se li estus rajdinta dum la nokto, li certe lacus je la mateno, kaj devus permesi pli longan kaj refortigan ne nur al si mem, sed eĉ plie al sia ĉevalo. Tio povus almenaŭ egaligi la antaŭdistancon de Santer.

La altaĵoj, kiujn Winnetou kaj lia patro nomis Nugget-tsil, rapide malaperis malantaŭ ni. Ni nun ĉiame havis la ebenan prerion antaŭ ni, sur kiu kreskis komence arbedoj, sed tiam estis nur senfina herbejo, unue riĉe verda, tiam sekiĝita. La spuro estis klare videbla. Santer plejparte estis rajdinta rapidege, tial la hufoj de sia ĉevalo lasis bone rimarkeblajn premsignojn.

Kiam ĝi komencis malheliĝi, ni deĉevaliĝis, kaj sekvis la spuron, kiun ni nun povis pli bone vidi irante, tiel longe plu, ĝis ĝi tute ne plu estis videbla. Je loko, kie la herboj denove estis riĉe verdaj, ni haltis. Tie la ĉevaloj povis manĝi. Ni pakis nin en kovrilojn, kaj kuŝiĝis pro dormi.

La nokto malvarmis. Mi rimarkis, ke miaj kunrajdantoj tial ofte vekis. Eĉ sen la malvarmo, mi ne estus povinta ekdormi. La morto de Intŝu-tŝuna kaj lia filino tenis miajn okulojn malfermite.

Kiam mi tamen foje fermis ilin, mi vidis iliajn korpojn kuŝi antaŭ mi en la sangoflako, kaj mi aŭdis la lastajn vortojn de Nŝo-tŝi. Nun mi riproĉis min mem, ke mi ne estis estinta pli afable al ŝi, kaj ke mi ne esprimiĝis alimaniere dum la interparolo kun ŝia patro. Ĝi estis, kvazaŭ mi estis pelinta ŝin en la morton per tio.

Je la mateno ĝi eĉ pli malvarmiĝis. Mi stariĝis, pro varmiĝi per irado. Sam Hawkens rimarkis tion, kaj demandis: „Certe malvarmas al Vi, ĉu, *Sir?* Vi estus devinta kunporti varmkruĉon en la okcidenton. *Greenborn*:oj ja ŝatas kunporti tiajn aĵojn. Do mi nur povas laŭdi mian malnovan vestaĵon. Nek indiana sago, nek varmecoj sukcesas iri tra ĝi. Ĉu mi pruntu ĝin al Vi, *Sir?*“

Per la malagrabra malvarmo, preskaŭ ĉiuj vekis jam je la matena heliĝo. Ĵus kiam ni povis revidi la spuron nur iomete, ni surĉevaliĝis, kaj plurajdis. Niaj ĉevaloj restadis, kaj certe ankaŭ estis frostintaj dum la nokto. Ĉar tio varmiĝis ilin, ili forte rapidis, senke ni devis instigi ilin.

Ni ankoraŭ rajdis sur la prerio. Nun ĝi ondumiĝis. Sur la altaĵoj de la ondaĵoj, la herboj kreskis malseke kaj rigide, en la valaĵoj riĉe kaj verde. Kelkloke estis flakoj, kie ni haltis kaj lasis la ĉevalojn trinki.

Dum la spuro estis ĝis tie kondukiĝinta preskaŭ ekzakte orienten, ĝi iĝis ĉirkaŭ la tagmezo ĉiam plu suden. Kiam Hawkens rimarkis tion, li faris pripensan manieron. Mi demandis lin pri lia ekpripensado.

„Se ĝi estas tiel, kiel mi pensas, niaj klopodoj verŝajne vanas.“

„Kial?“

„Tiu ulo firuzas. Li ŝajne volas fuĝi al la kajovajoj.“

„Tion li esperinde faros ne!“

„Kial ne? Ĉu li kompleze al Vi ekstaru meze en la prerio, kaj lasu sin kapti? Kion Vi pensas! Li faros ĉion pro saviĝi. Ĉiukaze li tenis sian okulojn malfermite, kaj komprenis, ke niaj ĉevaloj estas pli bonaj ol lia. Tial li supozas, ke ni baldaŭ renkonte venos al li, kaj li ekhavis la ideon peti azilon ĉe la kajovajoj.“

„Sed, ĉu ili akceptos lin amikece?“

„Ne dubblas pri tio unu momenton. Necesas al li nur rakonti, ke li mortpafis Intŝu-tŝunan kaj Nŝo-ĉin, kaj ili ovacios al li. Ni hastu, proke ni eble havos lin antaŭ la vespero.“

„Kiel freŝe estas la hodiaŭa spuro, laŭ Via takso?“

„Tio ne gravas. Ĉi tiun li lasis ankoraŭ dum la nokto. Ni atendu ĝis ni atingos la lokon, kie li restadis. Tiam ni vidos, kiel freŝe estas lia nova, hodiaŭa spuro lia. Ju pli longe li restadis, des pli baldaŭ ni kaptos lin.“

Je la tagmezo ni atingis la lokon, kie Santer estis haltinta. Oni vidis, ke la ĉevalo estis kuŝiĝinta. Ĝi certe estis tre laca, tion ni jam estis eksciintaj per la premsignoj. Ni taksis, ke lia nova spuro estis malpli ol du horojn freŝe. Ŝajne li estis dorminta pli longe, ol li estis intencinta. La antaŭiĝo de la nokta rajdado do estis egaligita. Nun ni estis pli proksima al li je duona horo ol hieraŭ, je la komenco de la persekuto.

Je la posttagmezo, ni denove havis verdan prerion antaŭ ni. Pli poste ni eĉ trovis arbedaĵojn. Post zorga prijuĝo de la spuro klariĝis, ke la antaŭeco nun estis nur duona horo plu. Antaŭ ni, la rando de la horizonto malhelis.

„Estas arbaro“, Sam ekkonis. „Mi supozas, ke ni atingos flankan rivereton de la norda branĉo de la Red River. Mi dezirus, ke estus pli da prerio antaŭ ni. Tio pli bonus al ni.“

Certe estus estinta pli bone, ĉar sur la savano oni povis vidi ĉion, sed en arbaro, oni eble facile iĝis en embuskon. Kaj pro la hasto, per kiu ni rajdis, estis neeble esplori la pejzaĝo, antaŭ ni rajdos en la arbaron.

Sam pravis. Ni trovis etan riveron, en kiu sede ne fluis akvo, sed nur havis, ie kaj tie, kelkajn per akvo plenitajn kavaĵojn. Sur la bordoj estis arbedoj kaj arboj. Ne estis vera arbaro, sed nur pli aŭ malpli grandaj grupoj de arboj, kiuj kreskis sur la bordoj en diversaj distancoj.

Mallonge antaŭ la vespero, ni estis tiel proksimaj al la persekutato, ke li povis aperi antaŭ ni ĉiun momente. Tio fervorigis nin eĉ plie ol antaŭe. Mi antaŭrajdis sole, ĉar mia rozfelulo elteniĝis plej bone, kaj ankoraŭ havis ĉiujn siajn fortojn.

Refoje ni rajdis tra unu el tiuj arbogrupoj, sur la maldekstra bordo de la rivereto. Kiam mi atingis, antaŭ ĉiuj aliaj, la lastajn arbojn, mi rimarkis, ke la spuro kondukiĝis dekstren, en la

senakvan riveringon. Tio estis mia feliĉo, ĉar kiam mi rigardis la riveringon pli detale, mi faris ekscion, kiu igis min tuj ekcedi de la rando de la arbareto, kaj kaŝiĝi.

Se oni estus irinta nur kvicent paŝojn piede de tiu arba areto, oni estus atinginta alian arbareton, sur la alia bordo de la rivereto. Antaŭ tiu indianoj estis lasintaj iliajn ĉevalojn ĉirkaŭiri libere. Mi vidis fostojn, starigitajn en la teron, kiuj estis ligitaj per rimenoj, de kiuj pendis viandaĵoj. Se mi estus rajdinta nur unu ĉevallongecon plu, mi estus ekvidita de la ruĝuloj. Mi deĉevaliĝis, kaj atentigis miajn kunulojn pri mia ektravaĵo.

„Kajovajoj!“ unu el la apaĉoj diris.

„Jes, kajovajoj“, Sam konsentis. „La diablo ŝajne tre amas tiun Santer:on, ke li lasis lin trovi helpon ĵus en la lasta momento. Jam bezonis al ni, nur elteni niajn manojn, pro kapti lin. Sed tamen li ne sukcesu forkuri.“

„Ne estas granda grupo de kajovajoj“, mi komentis.

„Hm! Ni nur vidas la ruĝulojn, kiuj estas sur tiu flanko de la arboj. Certe malantaŭ tiu estas kromaj. Ili estis ĉasintaj, kaj nun prilaboris iliajn viandaĵojn tie ĉi.“

„Kion ni faros, Sam? Ĉu ni turniĝu reen, pro cedi laŭeble for?“

„Ne ekideos al mi! Ni restos tie ĉi.“

„Sed estas dangere!“

„Tute ne!“

„Kiel facile ruĝulo povas veni ĉi tien!“

„Ne ekideos al iu el ili. Unue ili troviĝas tie transe, sur la alia bordo. Kaj due baldaŭ malhelos, kaj tiam ili ne plu malproksimiĝos de ilia restejo.“

„Sed ju pli gardiĝe, des pli bone!“

„Kaj ju pli timplene, de pli *greenhorn*:ece! Mi diras al Vi, ke ni estas tie ĉi tiel savaj antaŭ tiuj kajovajoj, kvazaŭ ni troviĝus en Novjorko. Ili eĉ ne pensos pri ektransiri tien ĉi. Sed ni transiros al ili. Mi devas havi tiun Santer:on, eĉ se mi devus transporti lin el la mezo de miloj da kajovajoj.“

„Alikaze Vi mallaŭdus min esti tio, sed hodiaŭ Vi estas tio: senprudentulo!“

„Kio? Kiu? Ĉu pripensulo? Sam Hawkens, kaj senprudentulo, ĉu? Mi nur ridas pri tio, hihihih! Tion neniam ajn iu antaŭe riproĉis al mi! *Sir*, alikaze Vi ja ne estas tiel timeme, kaj eĉ atakas al grizurson per tranĉilo. Kial Vi tiel malkuraĝas hodiaŭ?“

„Ne estas malkuraĝo, sed gardiĝo. Ni estas tro proksime al la malamikoj.“

„Ĉu tro proksime? Ridige! Mi eĉ pensas, ke ni multe pli proksimiĝu. Nur atendu la malhelon.“

Hodiaŭ li estis tute alie ol kutime. La morto de la „bela, kara, bona ruĝa *mis*“ indignigis lin tiel, ke li sopiris venĝon. La apaĉoj konsentis pri lia praveco, kaj same Parker kaj Stone. Tial mi ne povis agi kontraŭ tio. Ni fiksligis niajn ĉevalojn kaj sidiĝis, pro atendi la malheliĝon.

Mi malgraŭ ĉio konfesu, ke la kajovajoj moviĝis, kvazaŭ ili sentis ilin tute sekure. Ili ĉirkaŭrajdis, kaj iris sur la libera ebenaĵo, interparolis kaj agis, kvazaŭ ili estis hejme en ilia sekura, bone gardata indiana vilaĝo.

„Ĉu Vi vidas, kiel sengardiĝaj ili estas?“ Sam diris. „Hodiaŭ neniuj malbonaj pensoj estas en ili.“

„Se nur Vi ne eraras!“

„Sam Hawkens neniam eraras!“

„*Pshaw!* Mi povus pruvi al Vi la malon. Estas io en mi, kiel antaŭsento, ke ili nur aktoras.“

„Antaŭsento! Maljunaj *squaw*-oj havas antaŭsentojn, neniu alie. Enmemorigu tion, *Sir!* Kia kaŭzo ekzistu, ke ili aktoras?“

„Pro allogi nin.“

„Tio tute ne necesas, ĉar ni venos ankaŭ sen allogado.“

„Vi ja supozas, ke Santer estas ĉe ili, ĉu ne?“

„Memkompreneble. Kiam li atingis ĉi tiun lokon, li vidis ilin, kaj rajdis al ili trans la malplena rieringo.“

„Kaj, ĉu Vi pensas, ke li rakontis al ili, kio okazis, kaj kial li petas ilian savon?“

„Kia demando! Tute kompreneblas per si mem, ke ili diris tion al ili.“

„Do li ja ankaŭ raportis, ke siaj persekutantoj verŝajne estas tre proksime post li.“

„Laŭ mi, eĉ tion.“

„Tiukaze ĝi mirigas min, ke ili ne faras iajn gardiĝaĵojn.“

„Mirigas min tute ne. Ili simple pensas, ke ĝi estas neeble, ke ni estas jam tiel proksime, ili ekspektas, ke ni venos nur morgaŭ. Ĵus kiam malheliĝis, mi kaŝiros transen, kaj rigardos la aferon. Tiam mi ekscios, kion ni faru. Mi nepre havu tiun Santer-on.“

„Bone, mi kuniros!“

„Ne necesas.“

„Mi kredas plene, ke ĝi necesas.“

„Kiam Sam Hawkens faras kaŝiradon, li ne bezonas helpanton. Mi ne kunprenos Vin. Mi konas Vin, kaj Viajn malutilajn homaranistajn sentojn. Verŝajne Vi eĉ volas santeni la vivon de tiu murdisto.“

„Ekideus al mi eĉ ne ensonĝel!“

„Ne aktoru!“

„Mi elparolas tion, kion mi pensas. Ankaŭ mi volas havi tiun Santer-on. Sed mi volas kapti lin nemortige, pro porti lin al Winnetou. Ekde mi vidis, ke neblas kapti lin sen mortigi lin, mi donos kuglon en lian kapon. Vi povas fidi pri tio!“

„Ĵus tio ĝi estas! Kuglon en la kapon! Vi ne volas, ke li estu torturota. Mi certe ne estas kontraŭanto pri tiuj rapidaj mortigoj. Sed al tiu fiulo mi elkore deziras plenplenan mortiĝadon. Ni kaptos lin, kaj portos lin al Winnetou. Mi nur sciu, kiom da kajovajoj tie estas. Kaj ke tie estas pli multaj ol tiuj, kiuj montriĝas, pri tio mi ja certas.“

Mi preferis silenti. La vortoj de Sam dubigis la apaĉojn. Ili ekscius, ke mi agus pro Rattler. Do estus facile al ili ekpensi, ke mi ne havis similajn intencojn. Mi agis, kvazaŭ mi konsentus pri la plano de Sam, kaj kuŝiĝis flanke de mia ĉevalo sur la teron.

La suno jam delonge estis malaperinta. Nun ĝi malheliĝis. Transe, ĉe la kajovajoj, kelkaj fajroj estis bruligataj. La flamoj brulegis alten. Tio alie tute ne estas kutomo de la gardiĝaj ruĝuloj. Tial la penso certiĝis al mi, ke ili celis al nia allogo. Ni kredu, ke ili sciis nenion, kaj ekhavu la ideon ataki ilin. Se ni farus tion, ni kurus ĵus antaŭ iliaj pafiltuboj.

Dum mi pripensadis, estis al mi, kvazaŭ mi perceptis brueton, kiu estis kaŭzita de neniu el ni. Estis aŭdebla de malantaŭ, kie neniu el ni kuŝis, ĉar mi kuŝis plej ekstere. Mi aŭskultis. La brueto ripetiĝis. Mi nun aŭdis ĝin pli klare, kaj povis rekoni ĝin. Estis la mallaŭta susurio de

branĉo, de kiu pendas malsekaj folioj. Ne, ĝi ne estis la moviĝo de glata branĉo, sed plie tiu de volvokreskaĵo. Ĝi havu pikilojn, aŭ dornojn, ĉar la brueto estis kaŭzata de skuetaro, de unu dorno post alia, nerapide.

Tio ekscio tuj klarigis al mi, kie mi serĉu la fonton de la brueto. Malantaŭ mi, inter tri proksime envice starantaj arboj, estis rubusujo, de kiu certe unu volvita branĉeto estis movigata. Eble tie estis nur eta besto. Sed en nia situacio endis gardiĝi. Same ĝi povis esti homo. Tion mi devis ekzameni.

Mi diris, ke transe, ĉe la kajovajoj brulis altaj fajroj. Ili ja ne povis transĵeti iliajn brilojn, sed mi povis vidi ĉion, kio estis inter ili kaj miaj okuloj. Tial la rubusujo nur estis atingebla, perke mi kaŝirus al ĝi de la transa flanko. Do mi stariĝis, kaj malrapide forpromenis, sed ne en la direkton, al kiu mi celis. Kiam mi estis sufiĉe malproksime, mi turniĝis reen, kaj proksimiĝis al la tri arboj de la malantaŭo. En ĝia proksimo, mi kuŝiĝis sur la teron, kaj mallaŭte rampis al la rubusujo, kiun mi atingis nerimarkite de miaj kunuloj. Ĝi estis rekte antaŭ mi. Mi povis atingi ĝin per la mano, kaj la fajroj transbrilis en la saman direkton. Mi ja povis vidi tra kelkaj maldensejoj de ĝi, sed entute la rubusujo kreskiĝis dense. Sed, fakte, io denove bruetis, sed ne de la mezo, sed de unu flanko de la rubusujo.

Estis homo, indiano, en la heĝo, kiu estis volanta foriri. Sed per la dornoj, tio kaŭzu bruetaron, kiun li estis provinta onigi en pli longan tempon. Li faris tion vere majstre. Anstataŭ unu sola, laŭta sursuro, aŭdeblis nur mallaŭta, pajleca kraketo minuton post minuto, kiun mi nur estis aŭdinta, ĉar mi estis kuŝinta tiel proksime al la rubusujo. Nun li jam preskaŭ estis sukcesinta la malfacilan artaĵon. Liaj vestaĵoj estis preskaŭ jam plene liberigita de la dornoj. Nur unu ŝultro kaj la brako, la kolo kaj la kapo ankoraŭ estis en la rubusujo.

Mi rampis al li, ĝis mi kuŝis malantaŭ lia dorso. Li malrapide liberigis la ŝultron, la kolon, la kapon, kaj nun ankoraŭ nur devis eltiri la brakon. Nun mi ekstariĝis, ekprenis lian kolon per la maldekstra mano, kaj bategis la dekstran pugnon sur lian kapon. Li kuŝiĝis kviete sur la teron.

„Kio estis tio?“ mi aŭdis Sam:on demandi en nia restejo. „Ĉu Vi ne rimarkis ion?“

„La ĉevalo de Old Shatterhand piedbatis“, Dick respondis.

„Li forestas. Kie li estas? Li ja ne faru stultaĵojn!“

„Ĉu stultaĵojn? Ĉu li? Li neniam faris iaĵn, kaj neniam faros.“

„Hoho! Estas pensebla, ke li kaŝe vizitas la kajovajojn, kaj savas la vivon de tiu Santer.“

„Ne, li ne faros tion. Pli ŝate li premsufokus la murdiston, olke li lasus lin forkuri. La sorto de la du apaĉoj tuŝis lian koron. Vi certe ja rimarkis tion je li.“

„Eble. Sed tamen mi ne kunprenos lin, kiam mi pli poste kaŝiros al la kajovajoj. Li ja ne povas esti utile al mi. Mi volas nombri ilin, kaj esplori la ĉirkaŭon. Tiam ni scios, kiel ni ataku. Li faras siajn aĵojn sufiĉe bone kiel *greenhorn*, sed proksimiĝi al la restejo de la kajovajoj je tiel altaj flamoj, tion li certe ne jam kapablas. Tiuj uloj scias, ke ni venos. Ili do estos gardiĝe, kaj tiel streĉigos la orelojn, ke nur olda okzidentulo povos proksimiĝi al ili.“

Mi ekstaris, rapide paŝis al li, kaj diris: „Vi eraras, kara Sam. Vi kredis, ke mi estus for, sed fakte mi ankoraŭ ĉeestis. Ĉu mi nu kapablas la kaŝan aliron, aŭ ne?“

„Fulmotondro!“ li grumblis. „Vi vere ĉeestas, ĉu? Ni ja tute ne rimarkis Vin!“

„Pruvo, ke io mankas al Vi, kio laŭ Viaj vortoj mankas al mi. Cetere eĉ ĉeestas aliaj homoj krom mi, senke Vi eksciis ĝin.“

„Nu, kiu? Pri kiu Vi parolas?“

„Iru tien al la rubusujo. Tie Vi vidos lin, Sam.“

Li stariĝis. La aliaj sekvis lin.

„Nu!“ li elvokis. „Tie kuŝas indiano! Kiel tiu veniĝis tien ĉi?“

„Lasu tion diri al Vi de li mem!“

„Sed li ja mortas!“

„Ne. Mi nur senkonsciigis lin.“

„Sed kie? Do ne tie ĉi, ĉu?“

„Kie alie! Li kaŭris kaŝe ĉi tie en la rubusujo, kaj mi rimarkis lin tie. Kiam li volis eliri pro kaŝe foriĝi, mi donis bategon al li. Vi eĉ aŭdis la bategon, kaj pensis, ke ĝi estis piedbato de mia ĉevalo.“

„Ĉiuj diabloj, tio ĝustas! Do tiu indiano fakte ĉeestis, kaŝiĝis en la heĝo, kaj aŭdis ĉion, pri kio ni parolis. Bone, ke Vi sendanĝerigis lin! Fiksligu lin, kaj ŝtopu lian buŝon, se mi n'eraras! Sed kial li ne estas transe ĉe siaj samuloj? Kion serĉindis al li tie ĉi? Li ja certe estis tie ĉi, antaŭ ni venis ĉu?“

„Vi faras tiajn demandojn, kaj nomas aliajn homojn *greenborn*-oj, ĉu? Memkompreneble li estis tie ĉi pli frue ol ni. La kajovajoj sciis, ke ni venis. Ili supozis, ke ni estis sekvintaj la spuron de Santer, kaj certe aperis tie ĉi. Tial ili volis akcepti nin. Pro ne maltrafi la ĝustan momenton, ili posteniĝis gardiston, kiu informu ilin. Sed ĉar ni rajdis tro rapide, aŭ ĉar li tiumomente ne sufiĉe atentis, aŭ ĉar li venis tien ĉi, kiam ankaŭ ni aperis, ni surprizis lin, tielke li devis kaŝiĝi tie ĉi en la rubuso.“

„Sed li ja havis la eblecon fuĝi!“

„Certe li ne havis la tempon pro tio. Ni estus vidintaj lin forkuri, tiel ke ni estus eksciantaj, ke la kajovajoj atendas nin. Ankaŭ eblas, ke li decidis dekomence kaŝiĝi tie ĉi, pro kaŝaŭskulti nin.“

„Tio ĉio bone eblas“, Sam grumblis. „Sed ĝi estu, kiel ĝi estas, ĉiel ĝi estas feliĉaĵo, ke ni kaptis lin. Nun li devas konfesi ĉion.“

„Li rifuzos diri ion. Vi ekscios nenion de li.“

„Eble, sed ankaŭ ne necesas, ke ni kloopodiĝas per li. Ni scias, kion ni pensu. Kion ni ne jam scias, tion mi scias baldaŭ, ĉar mi nun iros transen.“

„Pro eble neniam reveni!“

„Kial?“

„Ĉar la kajovajoj tenados Vin. Vi ja diris mem, ke tre facilas, kaŝe proksimiĝi je tiaj grandaj kaj helaj fajroj.“

„Jes, li ne sukcesis ĝin, sed mi sukcesos. Tial mi transiros, kaj Vi restas tie ĉi.“

Li diris tion tiel decidite kaj ordone, ke mi devis kontraŭdiri al li:

„Vi estas hodiaŭ kvazaŭ anstataŭita, Sam. Ĉu Vi vere kredas, ke Vi povus ordoni al mi? Ĉu vere?“

„Memkompreneble mi kredas tion.“

„Tiukaze mi diru al Vi, per ĉia amikeco, ke Vi eraras. Eĉ rigardante la multajn aĵojn kaj kapablojn de okcidentulo, kiujn Vi lernigis min, mi tamen delonge ne plu estas Via lernanto, al kiu Vi rajtas ordoni. Aŭ ĉu mi nombru diversajn aĵojn, kiuj kuŝas en Via memoro tre

malagrabla al Vi? Krome, la persekutado de Santer estas tute nur mia afero. Winnetou transdonis tiun taskon al mi, tial valoru, kion diras mi, kaj ne Via ordono. Ĉu tio klaras, Sam Hawkens?”

„Vi faras tre solenajn parolaĵojn, *Sir*, se mi ne eraras. Sam Hawkens estas maljuna okcidentulo, dum Vi estas greenhorn, kaj Vi restos unu. Tion Vi ne forgesu, se Vi ne volas ŝajni maldankema. Ĝi restas tiel: mi nun iras, kaj Vi restos tie ĉi!”

Fakte li ekiris. La apaĉoj grumblis pri li, kaj ankaŭ Stone ĉagrenite komentis:

„Li vere estas hodiaŭ tute alia ol kutime. Riproĉi al Vi nedankemon! Ni devas esti dankemaj al Vi, ĉar sen Vi ni ne estus vivantaj plu. Ĉu li ajn iam savis Vian vivon?”

„Lasu lin!” mi respondis. „Li estas malgranda, glora ulo, kaj ĵus lia hodiaŭa konduto proas pro li. La kolero pri la morto de Intŝu-tŝuna kaj Nŝo-tŝi kulpas. Sed mi ne obeos lin. Mi nun ankaŭ iros. Per lia ekscito, li facile povos riski ion senpripense, kion li evitus en laŭnorma animstato. Restu tie ĉi, ĝis mi revenos. Eĉ se Vi aŭdos pafojn, ne foriĝu de ĉi loko. Nur kiam Vi aŭdos mian voĉon, venu helpi al mi!”

Mi lasis mian ursmortigilon kuŝi tie, kiel ankaŭ Sam lasis sian Liddyn tie, kaj mi foriĝis. Hawkens estis irinta for de ni, rekte tra la riveringa valetto. Li do volis kaŝaliri de tie. Mi trovis, ke tio malĝustis. La kajovajoj sciis, ke ili ekspektu nun el la direkto, el kiu ankaŭ Santer estis veninta, do ili certe koncentrigis ilian atenton al tiu ejo. Mi decidis proksimiĝi de la alia flanko.

Tial mi iris laŭ la ĉiflanka bordo en la alian direkton, tiel malproksime, ke la brilo de la transe brulantaj fajroj ne plu povis trafi min. La arboj de la arbareto ŝirmis min antaŭ la lumo. Estis tiel malhele tie, ke mi sukcesis iri nerimarkite en la riveringon, kaj el ĝi sur la transan bordon. Nun mi estis sub la arboj, kuŝiĝis, kaj rampis plu. Brulis ok fajroj. Tiom multaj ne estis bezonataj, ĉar mi nombris nur ĉirkaŭ kvardek indianojn. La kajovajoj do nur estis bruligintaj la fajrojn pro montri al ni, kie estis ilia restejo.

Ili kunsidis en grupoj sub la arboj, kaj havis iliajn pafilojn pafprete antaŭ ili. Se ni estus estinta tiel nepripensaj kuri en tiun insidaĵon, la afero estus finiĝinta malbonege al ni. La insido cetere estis aranĝita tiel evidente kaj stulte, ke nur senspertaj okcidentuloj ne estus rimarkintaj ĝin. Mi vidis, ke la ĉevaloj de la ruĝuloj paŝtiĝis ekstere sur la ebena prerio.

Mi volis provi, kaŝaŭskulti unu el la grupoj, laŭeble tiu, en kiu troviĝis la estro, ĉar tie eblus plej certe ekkoni, kion mi sciu. Sed kie la estro serĉendis? Supozeble en la grupo, en kiu Santer sidis, tion mi diris al mi. Do mi ŝoviĝis antaŭen de arbo al arbo, pro ek trovi Santer:on.

Post kelka serĉado, mi vidis lin. Li kunsidis kun kvar indianoj, el kiuj sede neniu portis la signaĵon de ĉefa digno. Sed tio ankaŭ ne necesis, ĉar laŭ la moroj de la ruĝuloj, la plej maljuna el ili estu la ĉefo. Bedaŭrinde mi ne povis riski kaŝrampi tiel proksimen, kiel mi ŝate volis. Ne estis kreskaĵoj, en kiuj mi povis trovi kaŝon kaj gardon. Sed kelkaj arboj staris tiel, ke iliaj ombroj akcepteble donis ŝirmon al mi. Ĉar brulis ok fajroj, ĉiu arbo havis plurajn ombrojn kaj duonombrojn, kiuj flagris jen kaj reen, kaj donis fantomecan aspekton al la interno de la arbareto.

Je mia ĝojo la ruĝuloj laŭte interparolis. Ĝi ja ne estis ilia intenco konduki kaŝume. Ni ne nur vidu ilin, sed ankaŭ aŭdu ilin. Mi atingis la menciitan ombron, kaj restis kuŝante ĉirkaŭ dek du paŝojn for de la grupo de Santer. Estis ne malgranda risko, ĉar mi povis esti multe pli facile rimarkata de la aliaj ruĝuloj, ol de tiu ĉi grupo.

Mi aŭdis, e Santer paroladis fanfarone. Li rakontis pri la *nugget*:a monto, kaj postulis al la ruĝuloj, iri tien kun li, pro haviĝi la trezoron.

„Ĉu mia blanka frato konas la lokon, kie ĝi troveblas?“ demandis la plej maljuna el la kvar indianoj.

„Ne. Ni volis elspioni ĝin, sed la apaĉoj revenis tro frue. Ni kredis, ke ili estus restintaj tiel longe en la kaŝejo, ke ni povus kaŝaŭskulti ilin.“

„Tiukaze ĉiu serĉado estos vana. Dekoble cent viroj povus iri tien pro esplorado. Ili trovos nenion. Sed ĉar mia frato mortpafis la plej eminentan el niaj malamikoj kaj lian filinon, ni faros al li la komplezon pli poste rajdi tien, kaj helpi al li serĉadi. Sed antaŭ tio, ni kaptu viajn persekutantojn, kaj poste ankaŭ iru pro mortigi Winnetoun.“

„Ĉu Winnetoun? Sed tiu ja estos inter ili!“

„Ne, li ne rajtas forlasi siajn mortulojn, kaj ankaŭ certe tenis la plej grandan parton de siaj militistoj ĉe si. La pli malgranda parto rajdis post Vi, kaj estas estrata de Old Shatterhand, la blanka huno, kiu disŝmesis la genuojn de nia ĉefo. Tiun aron ni hodiaŭ atakos.“

„Post tio ni rajdos al la oreromonto, pro senvivigi Winnetoun kaj serĉi la oron!“

„Tio ne eblas tiel baldaŭ, kiel mia frato pensas. Winnetou entombigu sian patron kaj sian fratinnon. Dum tio li ne estu ĝenata. La Granda Spirito neniam pardonos tion al ni. Sed kiam li estos farinta ĝin, ni atakos lin. Li ne iros al la urboj de la palvizaĝoj, sed hejmeniĝos. Ni embuskigos lin, aŭ allogos lin tiel, kiel ni hodiaŭ allogis Old Shatterhand:on. Mi nur atendas, ke mia esploristo revenas, kiu kaŝiris transen. Ankaŭ la gardistoj, kiuj kuŝiĝis for ekstere, ne jam sciigis min ion.“

Kiam mi aŭdis tion, mi ektimis. Do estis postenoj antaŭ la arbareto. Kio, se Sam Hawkens ne rimarkis ilin, kaj iĝis meze inter ilin! Apenaŭ mi estis finpensinta tion, mi aŭdis mallongan ekkrion de pluraj voĉoj. La estro salte starigis, kaj aŭskultis. Ankaŭ la aliaj kajovajoj silentis kaj aŭskultis.

Grupo proksimiĝis al la arbareto. Estis kvar ruĝuloj, kiuj kunirigis blankulon. Li defendiĝis, sed sen sukceso. Oni ja ne fiksligis lin, sed li estis malageblata per la tranĉiloj de la venkintoj. Tiu blankulo estis mia sengardiĝa Sam. Tuj mi estis farinta decidon. Mi ne devis lasi lin sub la forto de la kajovajoj, kvankam mi riskus mian vivon per tio.

„Sam Hawkens!“ Santer vokis, kiu tuj rekonis lin. „*Good evening, Sir.* Vi certe ne supozis trovi min tie ĉi, ĉu?“

„Fiulo, rabisto, murdisto!“ la sentima Sam vokis al li, kaj saltis al li pro ekpreni lian kolon. „Bone, ke mi havas Vin. Nun vi ricevas vian salajron, se mi n’eraras!“

La atakito defendiĝis. La ruĝuloj helpis, kaj ŝiris Sam:on for de li. Tio kaŭzis mallongan haoson, kiun mi rapide utiligis. Mi ekprenis la du revolverojn, kaj saltis meze inter la indianojn.

„Old Shatterhand!“ Santer kriis, kaj ektimigite forkuris.

Mi sendis du kuglojn post li, sed ne trafis lin, lanĉis plurajn pafojn al la ruĝuloj, kiuj cedis kriante, kaj vokis al Sam:

„For, post mi, ĉiam malantaŭ mi!“

La ruĝuloj ŝajnis esti rigidigitaj per teruro, kvankam mi pafis al ili. Mi ekprenis la brakon de Sam, kaj ŝiris lin for kun mi, en la arbareton, kaj malsupren al la riveringo. Tio ĉio okazigis tiel rapide, ke de mia atako ĝis nun pasigis apenaŭ pli ol unu minuto.

„*All devils*, tio ĝustatempis!“ Sam diris, kiam ni estis atingintaj la riveringon. „Tiuĵ fiuloj min—“

„Ne babilu, sed sekvu min!“ mi interrompis. Mi lasis lian brakon, kaj turniĝis dekstren, pro kuri malsupren en la riveringo. Unue endis, iĝi el la alpafebleco.

Maljam nun la surprizigitaj kaj konfuzigitaj ruĝuloj rekapabliĝis. Ilia kriadon eksonis malantaŭ ni tiel laŭte, ke mi ne plu povis aŭdi la paŝojn de Sam Altaj vokoj eksonis, pafoj krakis. Estis infera bruego.

Kial mi ne kuris laŭ la rivero al nia restejo, sed kontraŭ ĝi, en la alian direkton? La ruĝuloj komence ne povis vidi nin, ĉar malsupre en la riveringo malhelis. Ekspektinde ili kuris laŭrivero, ĉar ili supozis, ke ni fuĝis en tiun direkton. Ni do troviĝus baldaŭ en saveco, kaj tiam povus reiri al nia restejo per granda kurbo.

Kiam mi estis kurinta sufiĉe for, mi haltis. La kriadon de la ruĝuloj ankoraŭ bruis en la malproksimo. Kie mi staris, nenio moviĝis.

„Sam!“ mi vokis per neplena voĉo.

Neniu respondo.

„Sam, ĉu Vi aŭdas min?“ mi demandis pli laŭte.

Ankaŭ nun li ne respondis. Kie li estis? Li ja estu sekvinta min! Ĉu eble li falis kaj leziĝis? Mia fuĝo estis trans fendohava, sekiĝita ŝlimo, kaj tra profundaj akvaĵoj. Mi prenis kartoĉojn el la zono, reŝargis la revolveron kaj returniĝis, pro serĉi Sam:on per malrapidaj paŝoj.

La infera bruego de la kajovajoj ankoraŭ aŭdeblis. Tamen mi riskis proksimiĝi, ĝis mi ree staris apud la altaĵo de la arbareto, kie mi estis postulinta Sam:on sekvi min. Mi ne povis trovi lin. Certe li aliopiniĝis, kaj estis rekte grimpinta sur la transan bordon, sen atentiĝi pri miaj vortoj. Sed ĉi momente la brilo de la fajroj certe estis trafintaj kaj heligintaj lin, kaj li estis montriĝinta ne nur al la okuloj, sed ankaŭ al la kugloj de la kajovajoj.

Mi remalproksimiĝis de la arbareto, kaj kuris per kurbo al nia restejo.

Tie mi trovis ĉiujn en granda eksciteco. La ruĝaj kaj blankaj kunuloj urĝiĝis ĉirkaŭ min. Dick Stone vokis riproĉe:

„*Sir*, kial Vi malpermesis al ni veni post Vi, eĉ se oni pafus! Ni sopire atendis, ke Vi vokus. Dank’ al Dio, ke almenaŭ Vi reĉeestas, eĉ nelezita, kiel mi vidas!“

„Kie estas Sam? — Ne tie ĉi, ĉu?“ mi scivolis.

„Ĉu tie ĉi? Kiel Vi povas demandi tion! Ĉu Vi do ne vidis, kio okazis al li?“

„Nu kio?“

„Kiam Vi forestis, ni atendis. Post pli longa tempo, ni aŭdis kelkajn ruĝulojn voki. Tiam rekvetiĝis. Poste ni subite aŭdis revolverajn pafojn, kaj tiam terurigan kriadon. Krakis pafoj, kaj ni vidis Sam:on aperi.“

„Kie?“

„Malsupre ĉe la arbareto, sur la ĉi flanko bordo.“

„Mi ĝin antaŭsentis! Sam hodiaŭ sengardiĝemas, kiel neniam antaŭe. Plu, plu!“

„Li kuris al ni, sed multaj kajovajoj sekvis lin, kiuj atingis kaj kaptis lin. Ni vidis tion klare, ĉar la fajroj brulis tiel hele, kaj ni volis helpi al li. Sed antaŭ ni povis atingi la lokon, ili jam estis atingintaj la transan bordon, kaj malaperis sub la arboj. Ni ege volis sekvi ilin, pro ataki lin kaj liberigi Sam:on. Sed ni memoris Vian malpermeson, kaj devis rezigni pri tio.“

„Tio eĉ ĝustis, ĉar Vi dekunu viroj ne estus sukcesintaj ion, kaj estus mortigitaj ĉiuj.“

„Sed kion ni faru, *Sir*? Sam estas kaptita!“

„Bedaŭrinde jes, eĉ la duan fojon!“

„Ĉu la duan —“ li vokis surprizigite.

„Jes. Post la unua fojo, mi jam estis liberigita lin. Nur necesis al li sekvi min, proke li nun povus stari antaŭ Vi same libere kiel mi. Sed hodiaŭ li nu havas sian propran opinion pri ĉio.“

Mi rakontis al ili, kio okazis. Kiam mi estis parolinta, Will Parker diris:

„Do plene ne estis Via kulpo, *Sir*! Vi faris pli, ol ĉiu alia estus riskinta. Sam igis sin mem en tiun mizeraĵon. Sed ni ja ne tial lasu pereji lin en ĝi.“

„Ni li endas eligota. Sed tio nun estos multe pli malfacila al ni, ol ĝi estis al mi je la unua fojo. Ni povas esti certaj, ke la kajovajoj atentos duoble akre.“

„Prave. Sed eble estos tamen ŝanco finfine eligi lin!“

„Ĉio eblas. Sed estas dek du kontraŭ kvardek viroj, kiuj ekspektas esti atakataj ĉiumomente! Tamen restas al ni neniu alia ebleco, escepte de tiuj ekagi, ĉar ni eĉ malpli risku la atakon dum la tago.“

„*Well*, do ni atakos jam ĉi nokte!“

„Senhaste, senhaste! Tio estu pripensita.“

„Pripensu ĝin, *Sir*! Sed permesu al mi, dume kaŝiri transen, pro esplori la situacion.“

„Tion Vi faru, sed nur, kiam kelka tempo estos pasiĝinta, kaj ilia atento iom pli malakriĝis. Kaj tiam Vi ne iru sole, sed mi akompanos Vin. Verŝajne ni eĉ kunprenos ankaŭ la aliajn.“

„Bone, tre bone, *Sir*! Mi konsentas. Kunpreni ankaŭ la aliajn, tio sonas tute kiel atako. Ni plenumus nian devon. Pri ses aŭ ok kajovajoj mi certe povos okupiĝi, kaj Dik Stone ja same ne volos havi mapli da ili. Ĉu ne, olda Dick?“

„*Yes*, ekzakte trafita, olda Will“, Stone respondis. „Ne dependos de kelkaj pli aŭ malpli, se ĝi estu pro liberigi Sam:on. Alitempe li estas sagaca uleto, sed hodiaŭ ne estas unu el liaj eminentaj tagoj.“

Enmense mi pripensis, en kiu maniero li povus esti liberigota plej bone. Mian vivon mi certe estus riskinta pro li, sed ĉu mi rajtis, eĉ endanĝerigi la vivojn de la apaĉoj nur pro li? Eble oni povas atingi la celon pli facile kaj sendanĝere per ruzaĵo. Tio klariĝos, kiam ni estis kaŝironta transen. Pro esti preta agi en ĉiaj situacioj, mi planis komence kunpreni ankaŭ la apaĉojn. Eble klariĝos, ke subita atako donus avantaĝojn, kiujn ni estus povintaj akiri sen granda risko.

Intertempe ni ankoraŭ atendu, ĉar transe oni agis vigle. Sed iom post iom trankviliĝis. La kvieto estis nur interrompata de fortaj, fore ĉantaj batoj de tomahokoj. La ruĝuloj hakis lignaĵojn de la arboj. Verŝajne ili intencis lasi la fajrojn bruli, samintense kiel antaŭe, ĝis la mateno.

Tiam ankaŭ la hakilbatoj ĉesis. La steloj indikis noktomezon. Mi decidis, ke nun estis la ĝusta tempo komenci la agon. Unue ni certigis, ke la ĉevaloj, kiujn ni devis lasi tie, estis bone

fiksigitaj, kaj ne povis liberiĝi. Denove mi kontrolis la katenojn kaj la buŝoŝtopilon de la kaptita kajovajo. Tiam ni forlasis nian restejon, kaj iris laŭ la sama vojo, kiun mi estis irinta apud la riveringo.

Kiam ni staris en la arbareto, mi ordonis al la apaĉoj resti tie sub la estreco de Dick Stone, kaj eviti ĉiun brueton. Tiam mi mallaŭte pluiris kun Will Parker. Kiam ni estis atingintaj la bordan altaĵon, ni kuŝiĝis kaj aŭskultis. Profunda silento ĉie estis. Ni malrapide rampis antaŭen. La ok fajroj ankoraŭ brulis. Mi vidis, ke tutaj aroj de branĉoj estis enĵetitaj en ili. Tio ekdubigis min. Ni rampis plu, kaj ne vidis unu homon. Finfine ni ekkonis, ke la arbareto estis forlasita. Ne unu kajovajo plu tieis.

„Ili foriris, kaŝe foriris!“ Parker miris. „Kaj tamen ili incitis la fajrojn tiel!“

„Pro kaŝi ilian foriron. Dum la fajroj ankoraŭ brulas, ni pensu, ke ili ankoraŭ tieas.“

„Sed kien ili iris? Ĉu tute for?“

„Mi supozas tion, ĉar Sam estas bona akiraĵo al ili, kiun ili volas porto en savecon. Sed ankaŭ eblas, ke ili intencas diablecan agon.“

„Ĉu diablajon? Kia?“

„Ataki nin transe, kiu ni estus, se ni ne estus irinta pro ataki ilin tie ĉi.“

„Jes. Ni iru transen, kaj savu niajn ĉevalojn, eĉ se ĝi poste evidentiĝos kiel nenecesa. Ju pli gardiĝe, des pli bone.“

Ni iris malsupren al la apaĉoj, kaj kuris al nia restejo, kie ni sed trovis ĉion enorde. Sed la kajovajoj ja ankaŭ povis veni pli poste. Tial ni surĉevaliĝis, kaj rajdis kelkan vojon sur la prerion, kie ni restis. Se la kajovajoj ankoraŭ estus venontaj, ili ne estus trovinta nin je la eksa ejo, kaj devus atendi la taghelon pro trovi nin. La kaptitan kajovajon ni estis kunprenintaj.

Ankaŭ al ni ne indis io, krom pacienciĝo ĝis la mateno.

Kiam la tago komencis heliĝi, ni surĉevaliĝis, kaj rajdis al nia eksa restejo. Neniu estis tieinta. Do ni estis cedintaj sen kaŭzo. Sed tio ne damaĝis. Tiam ni iris tra la riveringo al la arbareto. La fajroj finbruliĝis, kaj lasis cindrejojn. Tiuj estis la sola signo, ke tie hieraŭ estis tiom multe okzinta.

Nun ni esploris la spurojn. De la loko, kie mi estis vidinta la ĉevalojn, la spuroj de la kajovajoj kondukis al sudorienta direkto. Ili ŝajne rezignis pri ataki nin. Tio ne estis utilaj al ni, ĉar ne plu estis eble, surprizi ilin.

Ili kunprenis Sam:on, kio ekscitegis Dick Stone:on kaj Will Parker:on. Ankaŭ mi bedaŭris la uleton. Mi estis preta fari ĉion sufiĉe prudentan pro lia liberigo.

„Se ni ne iros helpi al li, ili torturos lin sur la fosto“, Dick Stone plendis.

„Ne“, mi konsilis lin. „Ni ja ankaŭ havas kaptiton, garantiulo pro li.“

„Sed, ĉu ili scias tion?“

„Certe. Sam ĉiukaze estis tiel ruza ĝin diri al ili. Kiel ili traktos lin, tiel ni traktos nian kaptiton.“

„Sed ni alŭeble rapide rajdu post tiuj *indsman*:oj.“

„Ne.“

„Kio? Ĉu Vi ne volas helpi al li?“

„Ankaŭ ne. Sed mi ne volas lasi min tromi de tiuj ruĝaj uloj en la savano.“

„Ĉu trompi? Mi ne komprenas Vin.“

„Do nur vidu al tiu spuro! Kiel malnove ĝi povas esti?“

„Ili foriris jam antaŭ noktomezo, verŝajne.“

„Tion mi ankaŭ pensis. Ekde tiam pasiĝis ĉirkaŭ dek horoj. Ĉu Vi pensas, ke ni povos atingi ilin jam dum la tago?“

„Ne.“

„Kaj kion Vi pensas, kien ili rajdis?“

„Al ilia vilaĝo.“

„Tiukaze ili estos tie, antaŭ ni povos atingi ilin. Ĉu Vi opinias, ke ni du povus riski rajdi mezen en la kajovujon, pro ataki unu el ilia vilaĝo, kaj liberigi kaptiton?“

„Tio estus frenezaĵo.“

„Bone! Do ni interkonsentas, kaj ni ne rajdos post ili.“

Li gratis sin malantaŭ la orelo, kaj grumbliis senidde, kaj ĉagrenite: „Sed nia olda Sam! Kio okazu al li? Ni ja ne povas rezigni pri li, ĉu?“

„Ne, tion ni ja ne faros. Male, ni liberigos lin.“

„La diablo Vin prenu, *Sir!* Mi ne estis kreita pro klarigi tiajn enigmojn. Foje Vi diras, ke ni ne sekvu la ruĝulojn, kaj tuj poste Vi asertas, ke ilia kaptito estu liberigata. Tion komprenu, ajn kiu volas, sed ne mi!“

„Mi klarigos ĝin al Vi. Fakte la ruĝuloj volas iri al la *nugget*-monto.“

„Al la — *behold!* Ĉu tio vere ĝustas, *Sir?*“

„Ĝi ĝustas, Vi povas fidi pri tio. Mi eksciis tion, kiam mi hieraŭ kaŝaŭskultis interparoladon. Santer igis la ruĝulojn helpi al si dum la oroserĉado. Kaj la kajovajoj volas uzi la situacion, pro kapti Winnetuon.“

„Sed ili ja ne rajtas ĝeni la entombigon!“

„Ili ankaŭ ne volas. Ili atendos, ĝis ĝi estos farita. Unue ili volas agi, kvazaŭ ili reirus al ilia vilaĝo. Tio evitu, laŭ ilia supozo, ke ni sekvas ilin. Ili ja pensas, ke ni reiros al Winnetou. Sed kiam ili estos rajdintaj kelkan tempon sudorienten, ili alidirektiĝos, kaj rajdos al la *nugget*-monto. Laŭ ilia opinio, ni lasos nin tie ataki kaj buĉi nesciante.“

„Bela afero, belega afero! Sed ni zorgos, ke ĝi finiĝos alie.“

„Jes, ni zorgos. Ĉu Vi nun ankoraŭ volas rajdi post la kajovajoj?“

„Ne ideas al mi. Kion Vi opinias pri tio, olda Will?“

„Mi opinias, ke estas ekzakte tiel, kiel Old Shatterhand diris. Ni devas iri for de tie ĉi, pro povi averti Winnetoun ĝustatempe. Ĉu Vi konsentas, *Sir?*“

„Jes.“

„Kaj la kapiton ni kunprenos, ĉu?“

„Memkompreneble. Ni fiksligos lin sur la Maryn de Sam. Tuj kiam Vi estos farintaj tion, ni ekrajdos. Antaŭe ni serĉu akvejon malsupre en la riveringo, pro trinkiĝi niajn ĉevalojn.“

Duonan horon poste ni survojis, tre malkontente pri la sukceso de nia agado.

Anstataŭ kapti Santer:on, ni perdis Sam Hawkens:on. Ke tio okazis per lia propra kulpo, estis nur eta konsolo.

Dum la persekutado ni devis resti je lia spuro, kaj tial faris kromvojon, ĉar li alidirektiĝis dum la rajdado. Mi decidis mallongigi la vojon. Tial ni reestis jam mallonge antaŭ tagmezo de la sekvinta tago antaŭ la kanjono, kiu kondukis al la maldensejo, kie la atako estis okazinta.

Ni lasis la ĉevalojn, gardite de apaĉo, malsupre en la valo, kaj supreniris. Sur la rando de la maldensejo staris gardisto, kiu salutis nin per mansigno. Ni ekkonis je la unua vido, kiel diligente la dudek apaĉoj estis estintaj pro pretigi la entombigon de la ĉefo kaj sia filino. Mi rimarkis amason da maldikaj arboj, kiuj estis faligitaj de la tomahokoj, pro konstrui katafalkon. Krome estis grandaj amasaĵoj el ŝtonoj, kiuj estis pene alportigitaj, kaj ankoraŭ alportigataj. La apaĉoj, kiujn mi alkondukis, tiuj ekpartoprenis en tiu laboro. Mi estis sciigata, ke la entombigo estu okazonta jam je la sekvinta tago.

Flanke oni starigis simplan dometon, en kiu la du mortuloj estis kuŝigitaj. Tie ankaŭ Winnetou troviĝis. Estis dirata al li, ke ni alvenis. Li aspektis ektimigite.

Winnetou preskaŭ ĉiam seriozis. Nur malofte aperetis rideto sur lia vizaĝo. Neniam mi aŭdis lin ridi laŭte. Sed ĝenerale estis ĉiam esprimo de boneco kaj afableco en liaj vire belaj trajtoj, kaj liaj malhele velurecaj okuloj povis kelkfoje eĉ vidi amikece. Hodiaŭ lia vizaĝo ŝajnis malmoliginte ŝtonece. Liaj moviĝoj estis malrapidaj kaj pezaj.

Tiel li venis al mi, rigardis malklare kaj explore al ĉiuj flankoj, vidis en miajn okulojn per dolorplena esprimo, kaj demandis:

„Kiam mia frato revenis?“

„Ĵuse.“

„Kie troviĝas la murdinto?“

„Ni ne kaptis lin.“

Dum tiu respondi mi malleviis la vidon al la tero.

Ankaŭ li vidis teren. Mi ŝate estus ekkoninta liajn pensojn. Nur post longa paŭzo li demandis:

„Ĉu mia farto ĉesis la persekutadon?“

„Ne. Mi ankoraŭ persekutas. Li venos tien ĉi.“

„Old Shatterhand rakontu!“

Li sidiĝis sur ŝtonon. Mi malleviĝis flanke de li, kaj donis al li detalan raporton. Li aŭskultis ĝin pacience ĝis la fino, kaj ankaŭ silentis kelkan tempon poste, tiam demandis:

„Do mia frato ne scias ekzakte, ĉu la murdisto vere estis trafata de la revolveraj kugloj, ĉu?“

„Ne. Sed mi povas aserti, ke mi ne lezis lin.“

Li malrapide kapskuis, premis mian manon, kaj diris:

„Mia frato pardonu al mi la demandon, kiun mi faris; la demando, ĉu li ĉesis la persekutadon. Old Shatterhand faris ĉion, kion li povis. Sam Hawkens bedaŭre estis malpli pripense. Ni pardonos tion al li, kaj liberigos lin. Mi pensas same kiel mia frato. La kajovajoj venos tien ĉi. Sed ili trovos nin en alia loko, kie ili esperas trovi nin. La kaptito ne estu traktata perforte, sed arde gardata. Morgaŭ la tomboj estos starigataj ĉirkaŭ Inŝu-tŝuna kaj Nŝo-tŝi. Ĉu mia frato ĉeestos?“

„Ĝi tre dolorigus min, se Winnetou malpermesus tion al mi!“

„Mi ne nur permesas, sed mi eĉ petas tion de vi. Via ĉeesto eble savos la vivon de multaj palvizaĝoj. La leĝo de la sango postulas la morton de multaj blankaj viroj. Sed via okulo estas kiel la suno, kies varmeco malmoligas la glacieron, kaj estigas ĝin freŝiga akvo. Vi scias, kiun mi perdis. Estu al mi patro, kaj estu al mi fratino samtempe. Mi petas cin pri tio, Ŝarlih!“

Estis larmo en lia okulo. Li hontis, forkuris, kaj malaperis ĉe la mortuloj en la dometo. Cetere, li hodiaŭ nomis min la unuan fojon per mia antaŭnomo Karl, kaj ankaŭ poste neniam plu elparolis ĝin en alia maniero — sed Ŝarlih.

Nun mi fakte devus priskribi la entombigon de la sekvinta tago, kiu estis farata per ĉia indiana soleneco. Sed ajn kiam mi memoras tiujn malgajajn horojn, mi ankoraŭ hodiaŭ sentas tian profundan doloron, kvazaŭ ĝi estis nur hieraŭ. Tial mi petas rajti priskribi ĝin nur koncize.

La korpo de Intŝu-tŝuna estis fiksligata sur lian ĉevalon, tiam oni amasigis teron cirkaŭ ili, ĝis la vivanta besto ne plu povis moviĝi. Tiam ĝi ricevis kuglon en la kapon. La teramasĵo estis plialtigata, ĝi ĝi kovris la rajdanton, liajn armilojn kaj lian medicinaĵon, tiam ĝi estis ĉirkaŭe kovrata per pluraj tavoloj de ŝtonoj, ĝispinte.

Nŝo-tŝi per mia peto ricevis alian tombon. Mi ne volis lasi ŝin esti kovrata tiel simple per tero. Ni rektigis ŝian korpon laŭ la trunko de arbo en sidan pozicion, kaj formigis solidan, kavan piramidon ĉirkaŭ ŝi, el kies pinto elstaris la supro de la arbo.

De tiam, mi estas estinta kelkajn fojojn kun Winnetou ĉe la Nugget-tsil, pro reviziti la tombojn. Ni ĉiam trovis ilin netuŝite.